




**Bildo 1**: Komparo de la du konkurencaj hipotezoj de *Durette-Desset et al.(1999)* kaj *Hoberg & Lichtenfels (1994)*

***Fig. 1**: Comparison of the two competing hypotheses of Durette-Desset et al.(1999)* and *Hoberg & Lichtenfels (1994)*




**Bildo 2**: Kladogramo montranta la filogenezajn rilatojn inter 9 taksonoj el la triĥostrongiledoj (laŭ *Woyda*). A – B = Baza trunko de *Trichostrongylidae*

***Fig. 2**: Cladogram showing the phylogenetic relationships of 9 taxa of the Trichostrongylidae (after Woyda). A – B = Basic trunc of the Trichostrongylidae*

**Priaŭtora informo**

La aŭtorino prilaboras la temon parazit-gastiganta kunevoluado kadre de "Graduit-Kolegio" ĉe Berlina Libera Universitato cele al doktoriĝo.

**Adreso de la aŭtorino**

*Nadine* WOYDA
*FU Berlin, AG Evolutionsbiologie*
*Königin-Luise-Str. 1 – 3*
*DE – 14195 – Berlin* / GERMANIO



## Scienca eĥo

### Ruĝo – la plej grava koloro de la prahomo

En la griza pratempo eble la unua koloro, kiun perceptis la tiamaj homoj, estis tiu koloro, kiun oni povis flarsenti kaj gustumi: la koloro de avido, de mortigita sovaĝbesto, de ĉastriumfo, de vivo kaj morto, de venko kaj nutraĵo, la koloro de sango – ruĝa! Sed sango rapide fariĝas bruneta, konsekvence oni tuj serĉis kaj trovis anstataŭaĵon: okron. Ĝi ne diskoloriĝas, ne estas manĝebla, ne estas uzebla por varmigi sin, kaj – ĝi estas proksima al la ruĝa… Ruĝa (la unua kolorvorto en ĉiuj lingvoj) estas origino de sankteco, estas magia, simbolo de forto kaj potenco, estas plifortiga asisto por la mortintoj – samtempe ankaŭ malhelpilo por ties reveno surteren. Ĝis 10 kg da ruĝa okro (kiu ne ĉie troveblas!) oni entombigis kune kun ili. Okro animis kaj efektivigis antaŭ 40 000 jaroj la fosadon de la unuaj galerioj kaj, antaŭ 10 000 jaroj, fariĝis la unua komercaĵo de la homaro – antaŭ ol, pli poste, la kavern-pentristoj uzis ĝin… (2004-05-14)

### Kontikia truko

En la jaro 1947 la norvega etnologo kaj zoologo *Thor Heyerdahl* (1914-2002) komencis sian 101-tagan ekspedicion per la balza floso "*Kon-Tiki*", dum kiu li de la perua marbordo ĝis la polinezia *Tuamoto*-arĥipelo trapasis entute 8000 kilometrojn. Antaŭpreparante la kuraĝan entreprenon li bezonis ne nur sciencan helpon sed ankaŭ la subtenon de armeaj oficoj. Tiurilate la brita arme-misio en Vaŝingtono metis sub lia dispono novan "ŝarkpulvoron", kiun oni nur devis disŝuti en la akvon por forpeli la ŝarkojn cele de sendanĝera naĝado. Kiam *Heyerdahl* pridemandis la fidindecon de tiu ĉi mirakla pulvoro, la koncerna ataŝeo ridete respondis: "Ĝuste tion ni ja volos eltrovi kun via afabla subteno..." (2004-04-24/25)

### Ne hontu, dormemuloj!

Ignorantoj de regula dormado estis ekz. Napoleono, Frederiko la II-a de Prusujo, Aleksandro de Humboldo. La sciencisto kaj eltrovinto Edisono konsideris dormadon kiel malbonan kutimon, la miliardulo Rokefelro simple kiel "prirabadon", la aŭtomobilfabrikanto Henriko Fordo kiel "tute superfluan entreprenon". Kontraŭargumentis aliuloj. La filozofo Ŝopenhaŭro konsilis, pagi akurate kaj sufiĉkvante la "tributon al la morto"; la kuracisto kaj verkisto *C.L.Schleich*: "Fordonu dormante, se vi posedas la talenton por tio, la duonon de via vivo - poste vi estos duoble